# tejo:aktuale

n°513 | Februaro 2026

**Karaj abonantoj, bonvenon al printempo!**

En Roterdamo la tagoj plilongiĝas, la lumo revenas, kaj kun ĝi venas freŝa energio por novaj ideoj kaj iniciatoj. En la Centra Oficejo sentiĝas etoso de laboremo kaj antaŭĝojo: ni preparas nin por novaj defioj kaj la venontaj Esperanto-okazaĵoj, kiuj jam komencas plenigi la kalendarojn. ✨

El surprize suna ĉi-semajne Roterdamo salutas vin la volontuloj – Kjara, Franĉesko kaj Konrado – kun energio, entuziasmo kaj deziro kunhavigi kun vi la plej freŝajn novaĵojn de TEJO. ☀️

Ni deziras al vi agrablan legadon kaj belan komencon de la sezono!

## ALVOKOJ




### Partoprenu IJK-n

Por la sukceso de IJK gravas la partopreno de junuloj el ĉiuj mondopartoj, kiuj kontribuas al la programo kaj organizado de la kongreso.

Financa subteno estas havebla por tiuj, kiuj deziras partopreni en la kongreso, kaj pro siaj kompetentoj kaj kontribuoj al la movado meritas tion, sed ne disponas pri ekonomiaj rimedoj por tion realigi.

Legu pri la kondiĉoj en nia retejo. Sendu vian kandidatiĝon **ĝis la 22-a de marto!**

### Proponu kontribuon al la Taga Programo de IJK




Ĉu vi havas ion, kion vi ŝatus diskonigi al aliaj IJK-anoj? Ĉu vi fakas pri iu temo kaj deziras, ke ankaŭ aliaj lernu pri tio? Ĉu vi emas gvidi ludon, sportumadon aŭ ion ajn amuzan?

Ĉiuj proponoj rilataj al la kongresa temo: "Naturo el la homaj okuloj" estas aparte bonvenaj.

Sendu viajn proponojn por la Taga Programo per ĉi tiu formularo **ĝis la 15-a de junio!**

# ANONCOJ




## Filmeto por la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo

**La 21-a de februaro** estis speciala tago, dediĉita al lingvoj, dialektoj kaj kulturaj heredaĵoj, kiuj estas la fundamento de niaj identecoj. Ĉi-okaze, TEJO kreis inspiran filmeton, en kiu esperantistoj prezentis originalajn proverbojn de siaj gepatraj lingvoj kaj klarigis iliajn signifojn, disvastigante saĝajn vortojn kaj sciojn en la komunumo.

Spektu ĝin kaj lasu sub la filmeto komentojn pri viaj plej ŝatataj proverboj en viaj gepatraj lingvoj!

# EVENTOJ




## TEJO okazigas la Kunsidon Internacian de Afrikaj Lingvoj

KIAL estas okazo por esperantistoj en la tuta mondo ekkoni pli da lingvoj kaj kulturoj de la afrika kontinento per prelegoj kaj artaĵoj proponataj de junuloj. Nepre ne maltrafu ĝin!

Aliĝu al la evento **la 1-an de marto je 12:00 UTC** per jena ligilo.




## Iĝu helpanto por IFJ kaj ricevu rabaton

Printempo alvenas… kaj same rapide alproksimiĝas Internacia Junulara Festivalo! Post unu monato, **de la 1-a ĝis la 7-a de aprilo**, atendas vin eĉ pli suna **Cervia.**

Kaze ke vi ŝatus partopreni kaj kontribui al ĝia organizado ĝuante rabaton, jen grava informo por vi. Taskoj tre facilas kaj vi estos okupata nur 2 tagojn dum la festivalo.

Se tiu ĉi propono ŝajnas al vi alloga, ne prokrastu kaj kontaktu la organizantojn: iej@esperanto.it.

Pliaj informoj pri la evento ĉi tie.

Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!

Trovu pli da eventoj en Eventa Servo!




La 17-an de februaro 2026, laŭ la ĉina kalendaro, komenciĝis nova jaro. Ĝi daŭros ĝis la 5-a de februaro 2027.

Ĉiun ĉinan zodiakan signon akompanas unu el la kvin elementoj: metalo, akvo, ligno, fajro kaj tero; la jaro 2026 apartenas al la fajra ĉevalo. Ĉevalo simbolas sendependecon, moviĝon kaj necesojn de ŝanĝo, oni agu do brave, sed sekvante preparitan planon kaj kun paŭzoj por replenigi fortojn.

Fajro estas simbolo de fervora entuziasmo, vigleco kaj pasio. Tiu ĉi jaro favoras por novaj komencoj, kuraĝaj profesiaj decidoj kaj vojaĝoj. Ĉiuj el ili postulas multan energion. Sed memoru: fajra ĉevalo ne eltenas kaoson. Se vi provos sekvi tro multajn liniojn, vi tro frue elĉerpos vian agemon kaj riskos ne atingi viajn celojn.

Plej rekomendindaj strategioj por la jaro 2026 estas: sekvu unu, maksimume du ambiciajn celojn, estu konsekvenca kaj ne forgesu ripozi.



## Rato

Vi pensas tri paŝojn antaŭ ĉiuj aliaj – kaj ĉi-jare tio denove savos situacion, pri kiu neniu eĉ rimarkis ke estas problemo. Sed atentu: ne ĉiu sekreta plano devas esti efektivigita je la 3-a nokte. Fidu ankaŭ aliajn, eĉ se vi jam kalkulis ĉion. Unu spontanea “jes” povus konduki al surprize bona kunlaboro.

## Bovo

Vi laboras silente, konstante, kaj iomete obstine. La jaro provos vian paciencon per homoj kiuj ŝanĝas planojn post kiam vi jam faris la tutan laboron. Profunda spiro. La steloj memorigas: vi ne devas porti la tutan mondon sur viaj ŝultroj. Sed jes, vi probable tamen sukcesos.





## Tigro



Via kuraĝo estas via superforto – kaj foje via distraĵo. Vi emas salti en situacion kun la energio de “ni faru tion!” antaŭ ol ĉiuj aliaj finis la frazon. Ĉi-monate indas aŭskulti ĝis la fino. La steloj sugestas: strategio estas same impona kiel spontaneeco. Sed konfesu – vi amas la dramon.



## Kuniklo

Vi serĉas harmonion, sed ĉi-foje vi eble devos diri ion ne tiom agrablan. Kaj tio estas en ordo. Ne ĉiu malkonsento detruas rilaton; kelkaj eĉ plifortigas ĝin. La steloj konsilas: via milda tono estas potenca ilo. Uzu ĝin. Kaj ne kaŝu viajn brilajn ideojn nur por eviti ondojn.



## Drako

Vi denove havas grandan vizion. Vere grandan. Tiel grandan, ke aliaj bezonas mapon por sekvi vin. Ĉi-monate provu dividi vian planon en pli malgrandajn paŝojn – ne ĉiuj povas flugi same alte. La steloj diras: inspiri estas bone, sed klarigi estas eĉ pli efike. ✨



## Serpento

Vi observas pli ol vi parolas – kaj tio donas al vi avantaĝon. Ĉi-monate iu subtaksos vin. Tio estas eraro. La steloj konsilas: ne necesas montri ĉiujn viajn kartojn tuj. Sed kiam vi parolos, faru tion klare. Via trankvilo estas via sekreta potenco.



## Ĉevalo

Via bezono moviĝi, ŝanĝi, komenci ion novan estas forta. Se vi sentas vin iom enuigita, tio estas signo: vi bezonas novan defion, ne novan distraĵon. La steloj avertas: ne forkuru de tasko nur ĉar ĝi postulas paciencon. Sed nova ideo? Ho, tiu jam galopas en via kapo.

## Kapro



Vi havas subtilan sentemon por etoso – kaj vi tuj rimarkos kie la energio ne fluas. Ĉi-monate vi povus esti la nevidebla gluo en grupo. Sed atentu: helpi ne signifas ĉiam cedi. La steloj konsilas: via kreemo meritas pli da spaco ol vi kutime donas al ĝi.



## Simio



Vi lerte improvizas, kaj ĉi-monate tio savos vin el situacio, kiu komence aspektas kiel kaoso. Sed ne tro fidu nur je via sprito. Iom da preparo ne malpliigas vian ĉarmon. La steloj sugestas: surprizo estas efika nur se ĝi ne fariĝas via sola metodo. 😄



## Koko

Vi rimarkas detalojn, kiujn aliaj ignoras – kaj vi ne hezitas diri tion. Ĉi-monate provu aldoni iom da diplomatio al via precizeco. La steloj memorigas: pravi ne ĉiam signifas venki. Sed via organizemo baldaŭ estos tre bezonata. Preparu vin por brili.



## Hundo

Via lojaleco estas profunda kaj sincera. Sed ĉi-monate vi eble devos elekti inter protekti iun kaj lasi tiun lerni memstare. La steloj konsilas: subteni ne signifas solvi ĉion. Via honesteco estos aprezata – eĉ se ne tuj.



## Porko

Vi ĝuas komforton kaj bonan etoson – kaj kial ne? Sed ĉi-monate aperas ŝanco, kiu postulas iom pli da kuraĝo ol kutime. La steloj diras: vi estas pli forta ol via reputacio sugestas. Kaj jes, vi ankoraŭ povas rekompenci vin poste per io dolĉa.




Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en

trejnadoj kaj projektoj kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

Ĉu vi volas kontribui sendante interesajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO-aktuale? Sendu viajn novaĵojn al info@tejo.org antaŭ la 23-a tago de la monato. Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO-aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas unufoje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** TEJO-volontuloj
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2026 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn? Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni la retpoŝtan bultenon.